

Enhavo

- **anoncoj**

Traduku usonan klasikaĵon por Liro-2014; Novaj varoj en la rebutiko; Two ways you can help create a new Esperantist; Artikolo en Wall Street Journal; Novaj brokantaĵoj en la rebutiko

- **Oazo de Esperanto: Remnants of a Dream**

loke - Ellen Eddy

Imagine a welcoming site in the middle of the desert, where you could relax and escape from the stresses of modern day life. Where you could enjoy a cultural and educational center that promoted peace and understanding. And imagine that the language spoken there was Esperanto.

- **NASK: Kiel mi pasigis mian someran ferion**

loke - Charlotte Mann

Danke al NASK, mi kapablas paroli Esperanton sen hezitoj. Sed pli grave, mi estas vera esperantisto nun. Mi havas bonajn amikojn en Esperantujo, mi sonĝas Esperante kaj la internacia lingvo certe estos grava en mia estonteco.

- **leterkesto**

Esperanto during the Great War

- **La vojo al proksima estonteco**

de la prezidanto - Orlando E. Raola

La vera pinto de mia kongresa partopreno estis la kunsido de la Amerika Komisiono, kie mi plenĝoje anoncis la grandan novaĵon: Esperanto-Societo Kebekia, Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-USA kune invitas la 102-an Universalan Kongreson de Esperanto al la urbo Montrealo en la somero de 2017! Persone temis pri la kulmino de plurjara strebado celanta venigi la UK-on al nia kontinento.

- **Pri makedona popolmuziko**

kulturo - Barry Friedman

La muzikaj instrumentoj kiuj kontribuas al la aparta sono de makedona popolmuziko estas diversaj kaj buntaj. Pli malnovaj kaj tradiciaj instrumentoj kiel la gaido (*гајда*, sakŝalmo), la kavalo (*кавал*, fluto), la tapano (*тапан*, dukapa bastamburo), kaj la tamburaŭo (longokola speco de liuto) estas uzataj kun pli nuntempaj instrumentoj.

- **“Ludo”**

senintenca esperantaĵo? - Lee Miller

—Ludon mi ludas. —Jes, sed kian?

- **“Morton”**

senintenca esperantaĵo? - Christopher Zervic

Eĉ en akuzativo. Ĉu vere tia risko?

ISSN: 1056-0297

Usona Esperantisto
Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2014:4-6 (jul-dec)

American Esperantist
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2014:4-6 (jul-dec)



Ĉi-numere:

- Anoncoj: Esperanto en la ĵurnalo *Wall Street Journal*
- Loke: Oazo de Esperanto
- De la prezidanto: Ni invitas UK-on al Montrealo
- Kaj pli...

Rekorda partopreno de NASK en Viktorio
(Fotoj de Steĉjo SCHWICHOW kaj Lottie ERICSON)

Traduku usonan klasikajon por Liro-2014

La redakcio de la gazeto *La Ondo de Esperanto* denove invitas vin al la tradicia literatura konkurso *Liro*. Post la pasintjara eksperimento, la organizantoj decidis konservi la novan strukturon de la konkurso. Ankaŭ en ĉi tiu jaro ĝi havos nur tradukajn branĉojn.



Por la anglalingva fako de la konkurso estas proponita la mallonga novelo *The roads we take* de O. HENRY. La novelo estas libere elŝutebla de Project Gutenberg [<http://gutenberg.org/ebooks/1595>].

Por la ruslingva fako estas proponita *Muĥi*, poemo de Aleksej APUĤTIN, elŝutebla de Wikisource [<http://goo.gl/PhJWIV>].

Partoprenantoj sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina GORECKA (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). Konkursaĵoj ne plu estos akceptataj post la 30-a de Novembro. Oni povas sendi la tekstojn rete (slipoj estu sendataj en apartaj mesaĝoj), al la adreso <sezonoj@yahoo.com>.

La laŭreatoj (unu en ĉiu branĉo) ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizantoj ĝis la 1-a de Januaro 2017 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la premiitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike. La kopirajto tamen restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizantoj en okazo de libroforma eldono. La plej bona traduko de la novelo de O. HENRY aperos en la antologio de anglalingva literaturo, eldonota de *Sezonoj*.

Novaj varoj en la retbutiko

- **PROFESIA UZO DE ESPERANTO**
Petr CHRDLE. Eseoj. Temoj inkluzivas: “Agado de Esperanto-firmao ekster la E-movado”, “Ekzemploj de ‘oficialigo’ de Esperanto”

“Eldona agado”, “Faka literaturo”, “Aŭtoraj rajtoj”, “Ekoturismo”, “Komerco”, “Kiel pligrandigi la Esperanto-merkaton”. Mola bindaĵo. 97 paĝoj. 2013. Ĉeĥujo. \$17.82



- **ESPERANTOLOGIO 5**
Diversaj aŭtoroj. Eseoj. Titoloj de kelkaj ĉapitroj: “La strukturo de E-o kiel faktoro por certigi ĝian funkcion rilate al Lingvaj Rajtoj”, “Organizaj strukturoj kaj la estonteco de E-o”, “Variantoj de Esperanto iniciatitaj de Zamenhof”. Mola bindaĵo. 150 paĝoj. 2011. Ĉeĥujo. \$24.48
- **ESPERANTOLOGIO 6**
Diversaj aŭtoroj. Eseoj. Titoloj de kelkaj ĉapitroj: “Radikoj kaj vortoj en Esperanto”, “Malpliigi pretervidojn kaj misavertojn de esperanta literumilo per eraromodelo”, “The learnability of the reflexive in Esperanto”, “Transpiranto: antisemitism, xenophobia, or just a joke?” Mola bindaĵo. 132 paĝoj. 2013. Ĉeĥujo. \$24.48
- **ĈU VI SCIAS?, LA KNABINO DE MIA KORO, LASU MIN FARI MUZIKON**
Théophile MAYOMA-DIANKEMBO. Tri kantoj de muzikisto el la Demokratia Respubliko de Kongo. Duono de la vendo-prezo iros rekte al la kantisto. Elŝuteblaj dosieroj. Po \$1.00.

Mendu de *Esperanto-USA*, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, aŭ rete [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].

Two ways you can help create a new Esperantist

1. If you find someone who seems interested in learning Esperanto but doesn't have access to a computer or a local class, mention that there is a beginning Esperanto correspondence course available from Esperanto-USA.

The fee is \$63 and includes all study materials and a personal tutor. An application blank is available from the administrator Dorothy Holland (phone 805-967-5241; address 5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara CA 93111-2521). If the \$63 fee is a handicap, suggest that the prospective student contact Dorothy Holland and apply for a scholarship (see #2 below).




2. Make a donation to Esperanto-USA's "Goldman Fund", which provides scholarships for prospective Esperanto correspondence-course students (Levels 1 and 2).

iele Schwartz-disĉiplo kaj humuro do certe ne mankas! \$10.00

- **KAVERNO APUD LA MARO**
Bertram POTTS. Mola bindaĵo. Bona stato. 228 pĝ. 1983. Dek unu rakontoj verkitaj en Esperanto. \$10.00
- **BILDSTRIA GVIDO AL GENETIKO**
L. GONICK kaj M. WHEELIS. Mola bindaĵo. Bona stato. 216 pĝ. 1996. Elangligis Sung Ho Cho. Perbilda enkonduko por granda publiko, kun multe da humuro. \$15.00
- **POŜATLASO DE LA MONDO**
Diversaj aŭtoroj. Malmola bindaĵo. Bona stato. 55 pĝ. 1971. Mapoj kaj ĝeneralaj informoj pri diversaj landoj. \$10.00
- **ĈU VI KONAS LA TERON?**
Endre DUDICH. Mola bindaĵo. Ne tre bona stato. 50 pĝ. 1983. Kolekto de eseoj pri geologio, kun pluraj ilustraĵoj kaj tabeloj. \$10.00
- **SALUTON, AMIKO (GESPORTISTOJ)** Diversaj aŭtoroj. Mola bindaĵo. Ne tre bona stato. 121 pĝ. 1988. Terminoj pri sportoj en Esperanto, la franca, kaj la angla. Eldonita por la Olimpiaj Ludoj de 1988 en Kalgario, Kanado. \$10.00
- **VIRINO ĈE LA LANDLIMO**
Marjorie BOULTON. Malmola bindaĵo. Bona stato. 195 pĝ. 1959. Kolekto de drametoj kaj skeĉoj, seriozaj, lirikaj, amuz-satiraj. \$12.00
- **KIEN LA POEZIO?**
Brendon CLARK. Malmola bindaĵo. Bona stato. 156 pĝ. 1957. Preskaŭ forgesita alternativo al *Parnasa Gvidlibro*. \$12.00
- **MAHATMO GANDHI**
Huberto ROHDEN. Mola bindaĵo. Bona stato. 183 pĝ. 1972. Donas atenton ĉefe al la ideoj kaj idealoj de la hinda politikisto. \$5.00
- **LATERNISTO, LA**
H. SIENKIEWICZ. Mola bindaĵo. Bona stato. 207 pĝ. 1973. Kvin rakontoj. \$7.00

Artikolo en Wall Street Journal

En Novembro aperis longa kaj favora anglalingva artikolo pri Esperanto en la ĵurnalo *Wall Street Journal*. Ĵurnalisto Charlie WELLS priskribis la gastigan reton *Pasporta Servo* kaj intervjuis plurajn esperantistojn el Usono, inkluzive de Jim MEDRANO, Amanda Higley SCHMIDT, kaj Steven BREWER. Cetere, en la reta versio aperas ankaŭ kelkminuta videaĵo [<http://goo.gl/PXF9Wj>]; en ĝi la aŭtoro mallonge prezentas Esperanton kaj poste promenas tra la stratoj de Novjorko kun membro Neil BLONSTEIN, kiu priskribas kelkajn vidindaĵojn Esperante.



Novaj brokantaĵoj en la retbutiko

Rimarku: membroj ricevas rabaton de 25%!

- **KROMOSOMOJ**
LORJAK. Mola bindaĵo. Bona stato. 155 pĝ. 1989. Ĉu murdistinktoj estas heredeblaj aŭ ne? Jen la ĉefa temo de tiu ĉi libro. Sed ne tro fidu la seriozecon de la temo. Lorjak ja estas



- NEKONATINO, LA
R. C. MUSCHLER. Mola bindaĵo. Bona stato. 66
pĝ. Amrakonto. \$5.00

Mendu de *Esperanto-USA*, PO Box 1129, El Cerrito
CA 94530, aŭ rete [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].

leterkesto

Esperanto during the Great War

One hundred years ago, the first world war started. It is a sad, but revealing chapter of history, with several empires struggling against each other after a political assassination. This great tragedy has led to other ones, such as the Great Depression and World War Two.

In the midst of this sad story, the new *Universala Esperanto-Asocio*, putting to use the language invented by Doctor Zamenhof, helped keep alive relationships between friends and family members separated by the war through an extensive postal network.

We need to remember the lessons of World War One. We need to remember and thank God for these valiant Esperantists working for peace.

— *Jason Freiberg*

Skribu al *Usona Esperantisto!*

Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri io lastatempe aperinta en *UE*. Leteroj estu prefere ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, ne pli ol 400. Sendu mesaĝojn al la redakcio.



La vojo al proksima estonteco

Orlando E. RAOLA

Denove ni troviĝas meze de la nordhemisfera aŭtuno, kio indikas la komencon de nova jaro en nia asocia vivo. Rapide pasis rimarkinda somero: unue NASK, la AMO-2 seminario kaj la uson-kanada kunkongreso en Viktorio/Sidnejo, B.K. Poste, unusemajna feriado hejme kaj ek al Suda Ameriko por la ceteraj aranĝoj. Bedaŭrinde, mi ne sukcesis partopreni la ILEI-konferenco en Montevideo, Urugvajo, ĉar American-flugkompanio decidis veturigi min unu tagon malfrue (interese, antaŭ dek du jaroj, kiam mi lastafoje vizitis Sudamerikon por Universala Kongreso, VARIG-flugkompanio faris ekzakte la samon kaj mi malfruis al la kongreso en Fortalezo).

Alveninte en Bonaero, mi ĵetis min rekte en la gigantan allogon de la ĉefurbo apud la Arĝenta rivero. Malfacile tiri sin de la beleco kaj kapturna vivanteco de tiu ĉi metropolo por eniri la kongresajn salonojn. Finfine mi sukcesis serioze okupiĝi pri la kongreso, ĉar ĝi estis bunta, bone organizita eĉ se relative malgranda. Kiel kutime, estis multe pli da farindaj kaj atentindaj aranĝoj ol iu ajn povus fizike partopreni. Do, oni ĉiam devis elekti. Jen resume mia elekto: kunsidoj de la Komitato de UEA dum du tagoj; prelego kadre de la Internacia Kongresa Universitato pri acidiĝo de naturaj akvomasoj en la planedo; prezentado de nova eldono de libro de Tibor SEKELJ, aranĝo kiun ĉeestis lia vidvino kaj lia filo; unua parolado kadre de pritraktado de la kongresa temo, kie mi dividis kun la kongresanoj ideon kiun mi esprimis unuafoje sur la paĝoj de Usona Esperantisto en n-ro maj-jun 2013; prezentado pri la situacio de ateismo en Usono kadre de la kunsido de ATEO, kie mi renkontis la malfacilecon akiri en nia lando anglalingvajn tradukojn de la verkoj de la franca filozofo Michel ONFRAY (surprizite mi trovis, tuj post tiu kunsido, ke eĉ en Esperanto oni povas trovi libron de Onfray en la Libroservo de UEA!); partopreno en la viglega Movada Foiro, kie ĉiuj volas sciigi ĉiujn pri ĉio Esperanta dum nur du horoj...

Sed la vera pinto de mia kongresa partopreno estis la kunsido de la Amerika Komisiono, kie mi


pleniĝoje anoncis la grandan novaĵon: Esperanto-Societo Kebekia, Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-USA kune invitos la 102-an Universalan Kongreson de Esperanto al la urbo Montrealo en la somero de 2017! Persone temis pri la kulmino de plurjara strebado celanta venigi la UK-on al nia kontinento. Ankoraŭ mi sentas, ke pluraj usonaj urboj povintus esti la gastigantoj de la kongreso, sed mi plene kaj sincere opinias, ke la tri asocioj kune sukcesos okazigi eksterordinaran feston en la urbego kebekia. Du tagojn antaŭ tiu ĉi kunsido, Ĵenja Amis retroŝte sendis reklamfolion, kiun mi intencis disdoni ambaŭ ĉe la kunsido de la Komitato kaj de la Amerika Komisiono. Mi rapide trovis presejon en la urbo, kie mi sukcesis presi centon de tutkoloraj kopioj. De tiam, jam pluraj homoj revas kaj eklaboras pri la estonta kongreso. Estas ege grave konscii, ke mankas ankoraŭ certeco pri la okazigo de UK en Montrealo, ĉar Seŭlo, ĉefurbo de Suda Koreujo ankaŭ pretas kandidatiĝi por tiu jaro. Do, ne temas pri afero certigita, sed pri vera konkurado. Nur la plenkonscia laboro de ni ĉiuj sukcesos konvinki ĉiujn en la mondo pri la taŭgeco, konveneco kaj plej grave, pri la ĝusteco venigi la kongreson al Montrealo: jam de pli ol jarcento la Universala Kongreso ne okazas en orienta Norda Ameriko; konvinki ĉiujn pri la fakto, ke ambaŭ la lokaj esperantistoj samkiel ĉiuj aktivuloj kanadaj kaj usonaj pretas laboregi senlace por la sukceso de nia kongreso. La Konstanta Kongresa Sekretario de UEA planas baldaŭ viziti Montrealon por konatiĝi kun la proponota kongresejo kaj kun la urbo ĝenerale. Mi promesis veturi tien por akompani lin dum la vizito kaj poste mi raportos al la fidelaj legantoj de UE pri la rezultoj.

Bonjour-hi-saluton! Ek al Montrealo 2017!

Oazo de Esperanto: Remnants of a Dream

Ellen EDDY & Brian BURG

Imagine a welcoming site in the middle of the desert, where you could relax and escape from the stresses of modern day life. Where you could enjoy a cultural and educational center that promoted peace and understanding. Where you could have solitude and be inspired by the natural beauty. And imagine that the language spoken there was Esperanto.



Map of Garden Grove's location in California.

© User:Arkyan / Wikimedia Commons / CC-BY-SA-3.0

That was the dream of J. Tilman Williams when he created the non-profit organization known as *Oazo de Esperanto*. Jay, as he was affectionately known, was a businessman as well as a former Mayor and long-time City Councilman of Garden Grove, California. He was also a long-time advocate of Esperanto. He had purchased 120 acres in the Mojave Desert town of Hinkley, California, south of Barstow, many years before. He donated that acreage to the non-profit, but still needed funds to construct a building on the site. Thus began a many-year campaign to raise the money. Esperantists and friends of Esperanto made donations over the years and were glad to receive a brochure early in the new millennium showing the building going up. All the funds collected were to go toward construction costs, none to overhead. Perhaps this last part was the undoing of the dream.

The building, with a meeting room and kitchen, was completed and even used a few times. But most people found the location to be just a little bit too far from populated areas to be practical. Then, in February 2008, Jay died.

Close friends were determined to keep Jay's dream alive. The Oazo Board of Directors at that time consisted of Nina Brazelton, Frank Hoffman, H. B. Corcoran, Wongill Kim, and Tom Summer. Nina was quite ill and unable to continue, and a meeting was called to elect a new Board of Directors. Long-time Esperantist (and friend of Jay) Brian Neil Burg was invited to that meeting and urged to volunteer to be a Board Member. (It should be noted that Board members and officers of Oazo de Esperanto are volunteers only; none have ever taken even a cent for the services they perform.) Brian agreed to get involved, and was added to the list of Board members. At a subsequent meeting, he was elected President. Roy Shlemon was the Treasurer, and H. B. Corcoran the Secretary. All legal matters concerning Oazo had been handled by Frank Hoffman from the beginning.

At first, the Board attempted to determine the status of Oazo and make a decision as to whether or not continuation of the project was feasible after Jay's death; that is, whether or not Jay's dream could be realized. Most of the Board members felt that the desert location was just too impractical. Only a few of them had ever been out to the site, and the distance and weather conditions made it difficult to manage.

Earlier there had been a caretaker living on the property, but that person had long since left. Frank Hoffman then explored the possibility of selling the property with a real estate agent, but she wrote back that the property had been heavily vandalized and she wasn't really interested in pursuing sale of the land.

At first the Board Members thought that maybe the land could be sold, and then a new property could

be purchased in a more desirable area where Jay's dream might be implemented. Ultimately they decided to sell the land and donate the proceeds to Esperanto-USA, to be placed in a fund in Jay's name to promote Esperanto.

That has been much easier said than done, however. The Board learned that the vandalism involved a door being kicked in, windows broken, and copper pipes torn out. They also came to realize that there was no insurance. (Remember the statement concerning overhead?) Because of the remoteness of Oazo, it was pointless to try to restore what little there was on the land. The decision was made to sell in an "as is" condition, but first attempts at a sale brought no offers. Meanwhile, property taxes had to be paid, and the limited monetary reserves were steadily dwindling.

The Board did not want all of Jay's work to revert back to San Bernardino County. So the property is now back on the market with a new real estate agent and renewed hope. To add insult to injury, however, it only recently came to the Board's attention that the property lies just outside the area where massive pollution by Pacific Gas and Electric led to the multi-million dollar lawsuit brought by Erin Brockovich in the 1970s. And a new lawsuit is apparently underway for alleged failure of PG&E to do the clean-up as ordered by the court. That has made the land less desirable and is forcing the listing price to be reduced.



The Oazo Board is still hopeful that someone will want a large chunk of land in the desert. As it turns out, adjacent land is also available for sale. So someone could, if they wanted, purchase approximately 240 contiguous acres in total – an area twice Oazo's current size. The agent thought that opportunity might be a draw for potential buyers. In fact, she almost had a buyer – until he learned of the lawsuit against PG&E, effectively ending the transaction.

And that is the status of Oazo de Esperanto today. The property is listed for sale, but so far there have been no offers. Enough money remains in the bank to cover property taxes for a few years, but that is all. Maybe an enterprising reader of this article will turn out to be a prospective buyer. Only time will tell.



Ellen EDDY

Ellen is organizer of the North American Summer Esperanto Institute (NASKEI). She lives with her husband Paul in Olympia, Washington.

[<eddyellen@aol.com>](mailto:eddyellen@aol.com)

NASK: Kiel mi pasigis mian someran ferion

Charlotte MANN

NASK estis sperto unika por mi. Ĝi estis mia unua longa vojaĝo en Esperanto-Lando; ĝi estis la unua vera kurso, kiun mi partoprenis en Esperanto; kaj ĝi estis mia unua Esperanta agado kun aliaj gejunuloj. Je la fino de NASK, mi sentis min kapabla verki, legi kaj babili, sen zorgoj pri la lingvo mem. La ok tagoj ĉe NASK estis mirindaj kaj mi dankas ĉiujn membrojn de la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) pro la stipendio, kiun mi ricevis. Tio, kaj la fakto ke ĝi okazis en Viktorio, kie mi loĝas, signifis ke mi povis partopreni en NASK, kvankam mi havas nur 17 jarojn kaj miaj gepatroj ne estas esperantistoj.

La unuan matenon de NASK, post interparolo kun kelkaj amikoj, mi decidis studi je la supera nivelo. Dum la ok tagoj de lecionoj, mi lernis ege multe de la instruisto, István ERTL, kaj de la aliaj gelernantoj. Ni parolis pri la gramatiko, ni havis konkursojn pri la kreado de vortoj, kaj ni legis artikolojn de diversaj fontoj. Vespere, ni devis verki eseojn kaj rakontojn pri temoj diversaj, ekzemple *La komenco de la mondo* kaj *Kiel Barack OBAMA iĝis esperantisto*. La venontan tagon ni laŭtlegis niajn tekstojn kaj faris korektadojn kaj proponojn. Ni diskutis, same, la erarojn de la hieraŭaj eseoj. La lastan tagon ni aktoris en scenoj el la mallonga rakonto *Ducent mejloj ĝis Talooska*. La supera nivelo estis iomete malfacila por mi, sed mi laboregis dum la ok tagoj de la kurso, kaj mia sciado pri Esperanto multe kreskis.

Post la tagmanĝo, kiam ni babilis en Esperanto pri strangaj sed interesaj aferoj, la prelegoj komenciĝis. La temoj estis diversaj kaj ili kreskigis mian sciadon pri ĉio, de voĉaktorado al tea ceremonio kaj de hiperteksto al la japana Esperanta movado. Ni tradukis poemon de Emily DICKINSON kaj ni eksciis pri norda Kanado. Mi lernis pli dum prelego ĉe NASK ol dum tago en la gimnazio. La ebleco studi per Esperanto anstataŭ pri Esperanto plaĉis al mi, kaj ĝi plifortigis la matenajn lecionojn.



Abengo (Chaoming CHO) prezentas pri I-ĝingo.

Fotis Lottie ERICSON.

La plej amuza kaj agrabla afero dum NASK estis, laŭ mi, la geamikoj kiujn mi ekkonis. Kvankam mi ĝuis la aliajn Esperantajn agadojn kiujn mi jam partoprenis, ĉiam mankis aliaj junuloj. Sed dum NASK, estis multaj aliaj gejunuloj, ĉefe el okcidenta Usono, kaj mi ne estis la plej juna. Kun miaj novaj amikoj, mi povis babili pri gravaj aferoj por junuloj, ene kaj ekstere de la Esperanta movado. De la politika situacio tra la mondo al la amo, niaj konversacioj ĉiam estis interesaj. Kune, ni promenis tra la kampuso, ni kantis kaj ni ŝercis. Kiam mi pasigis tempon kun ili, mi konfirmis kialon por lerni Esperanton.

La lastan nokton, post vespermanĝo kun amikoj, mi iris al la diplomceremonio. Kiam mi aŭdis mian nomon kaj mi ricevis mian atestilon, mi ege fieris, ĉar mi studis kaj lernis multe. Poste, ni spektis amuzan filmon de Christopher MIHM, *La giganta araneo*.



Nikvo WOODS kaj Charlotte MANN aktoras en la supera kurso.

Fotis Lottie ERICSON.

Finfine venis la tempo por adiaŭi. Mi malfeliĉis kaj preskaŭ ekploris kiam mi brakumis miajn novajn amikojn. Sed tiel estas en Esperantujo. Oni rapide fariĝas bonegaj amikoj sed post nelonge oni devas reiri hejmen aŭ komenci novajn aventurojn. Almenaŭ per la nuntempa teknologio, kiel *Facebook*, ni povas babili kune trans landlimoj kaj oceanoj.

La ok tagoj de NASK, sen ajna dubo, ŝanĝis kaj mian someron kaj mian estontecon. Fakte, ĝi plibonigis mian tutan vivon. Nun, mi denove havas pasion studi Esperanton. Mi jam pasigis tagojn post NASK, kiam mi ne devis labori, lernante pli pri la Esperanta gramatiko kaj aliaj aferoj, kiujn mi ankoraŭ ne komprenas. Mi volas legi dikajn librojn kaj mi volas verki kaj esprimi min Esperante.

NASK malfermis la tutan mondon por mi, kaj nun, pli ol iam, mi deziras vojaĝi tra la mondo por renkonti esperantistojn. Venontsomere, mi havos 18 jarojn kaj mi estos diplomita de gimnazio, do mi

povos vojaĝi kaj esplori la mondon. Mi volas iri al Esperantaj agadoj por ekkoni novajn amikojn kaj aliajn junulojn el nia vasta mondo, kaj espereble mi revidos miajn bonegajn amikojn de NASK, kiuj jam mankas al mi.



NASK-anoj promenas en Viktorio dum festo de Kanado-Tago.

Fotis Steĉjo SCHWICHOW.

Danke al NASK, mi kapablas paroli Esperanton sen hezitoj. Sed pli grave, mi estas vera esperantisto nun. Mi havas bonajn amikojn en Esperantujo, mi sonĝas Esperante kaj la internacia lingvo certe estos grava en mia estonteco. Pro tio, mi dankas al kaj NASK kaj KEA. Mia vivo neniam estos la sama, kaj tio ege plaĉas al mi. Kvankam NASK estis mia unua granda Esperanta sperto, ĝi certe ne estos la lasta.

Charlotte MANN

Charlotte estas juna esperantisto kiu loĝas en Viktorio, Brita Kolumbio. Ŝi partoprenis en NASK la unuan fojon en 2014.

Pri makedona popolmuziko

Barry FRIEDMAN

Oni ofte priskribas makedonan popolmuzikon kiel produkton de ĝia geografia loko ĉar Makedonujo estas vojkruciĝo de la oriento kaj la okcidento. Ĝi troviĝas ĉe la orienta rando de Eŭropo, sed ĝi estis sub turka regado dum preskaŭ 500 jaroj. Pro tio, turka influo estas forta en la muzikaj tradicioj.

La instrumentoj kiuj kontribuas al la aparta sono de makedona popolmuziko estas diversaj kaj buntaj. Pli malnovaj kaj tradiciaj instrumentoj kiel la gajdo (*zajda*, sakŝalmo), la kavalo (*кавал*, speco de fluto), la tapano (*тапан*, dukapa bas-tamburo), kaj la tamburao (speco de liuto kun longa kolo) estas uzataj kun pli nuntempaj instrumentoj kiel la gitaro kaj la akordiono. La rezulto estas verva, sprita sono, spicita per la historio kaj kulturo de Makedonujo.

Grava aspekto de tradicia makedona muziko estas la takto. La kutima takto en moderna muziko okcidenta ofte estas 4/4. Tradicia makedona muziko utiligas malpli ordinarajn taktojn, kiel 7/8, 11/8, 5/5, kaj 13/8. La plej kutima takto uzata tamen estas 7/8.



Dancantoj de la makedona popolmuzika trupo *Tanec* (Танец).
(*Vikimedia*)

Alia grava aspekto de tradicia makedona muziko estas ĝia daŭra efiko sur la homoj de Makedonujo. Tia muziko estis kaj ankoraŭ estas ligita al komuna dancado. Popoldancoj akompanataj de riĉaj kostumoj estas diversaj laŭ rapideco (de malrapida ĝis tre rapida), laŭ la deveno de la muzikistoj (el montaroj, urbetoj aŭ kamparo), kaj laŭ la aĝoj de gedancantoj. Same, la vestoj estas diverskoloraj: preskaŭ ĉiam gejunuloj portas ruĝajn kaj blankajn vestojn, kaj pliaĝuloj portas nigrajn, brunajn, kaj blankajn.

Makedona popolmuziko estas transdonita per forta familia tradicio dum multaj generacioj. Tiu tradicio daŭros kaj donados plezuron al la tuta mondo.



Barry FRIEDMAN


Barry estas esperantisto jam de preskaŭ 20 jaroj. Li ŝatas basbalon, lingvojn, kaj manĝi pasto-ringojn.

<bfriedma@chemistry.ohio-state.edu>

senintenca esperantaĵo?

“Ludo”

Lee MILLER



- Mi ludas *Ludon*.
- Bone. Kian ludon?
- Ludon mi ludas.
- Jes, vi jam diris, sed kian?!

“Morton”

Christopher ZERVIC



Eĉ en akuzativo. Ĉu vere tia risko?

Usona Esperantisto

Sendu kontribuojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktisto aŭ de Esperanto-USA.



Usona Esperantisto ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to an address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.